

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2010:2

## Nova muziko en Esperanto

*Vinilkosmo estas eldonejo kaj disvendejo de Esperanto-muziko. Ni iom legas el ĝia lasta informletero.*

Post multaj strebadoj por la enretigo de la elŝutejo, ni ne forgesis la malnovajn sonportilojn kiel la KDoj, kiujn eblas tuŝi kaj per kiuj oni ankaŭ povas ornamati..., ili daŭre vivas kaj disponeblas en nia diskoservo.



Kiel anoncote en decembro, la Afrika Kompilo vere aperis, kaj ne estis sen peno, sed estas kun granda plezuro ke ni aldonis ĝin en nia katalogo por la plej bono de la nuna esperanto-afrika scenejo, kiu ĝis nun estis ankoraŭ ne sufiĉe reprezentita.

Ankaŭ rara, Eterne Rima montras al ni ĝis kia grado esperanto adaptiĝas al ĉiuj esprimformoj kaj mirigas nin per

albumo de pura repo ununura en tiu stilo, sed kiu certe inŝpiros tutan movadon!

Nova projekto de Metala Kompilo kiun ni esperas transformi ankaŭ en plenumita promeso, novaĵoj de JoMo kiu partoprenis la Afrikan Kompilon kaj tiel subskribos ĝian oficialan aperon okaze de la Internacia Solidareca Forumo, kaj rendezuo en FESTO 2010 por antaŭgustumi la someron kiu tre baldaŭ alvenos!

Dolchamar, la popa elektrok-bando el Finnlando, preparas sian 3an albumon "Tranĵnenien", antaŭvidita apero dum printempo 2010.

Preparado de la albumo de Inicialoj DC, sendependa Elektropop-bando el Frankfurto en Germanio.

Atendante, spektu la novan muzikvideon, "Tatua Papili", registrita laŭ plena alta difino 'Full HD', kiu esploras la rilatojn inter poezio, teknologio kaj aritekturo, realigita kunlabore kun la tekstoj de Eric Languillat kaj la muziko kaj video de Roger Borges.

La Espero kun ĝojo povas konstati ke Esperanto-muziko vivas!

## Elektronikaj libroj alvenis

*Elektronikaj libroj enmerkatiĝas en Esperantujo Elektronikaj libroj en Esperanto ekzistas de multaj jaroj, sed ĝis lastatempe ne multe disvastiĝis, ĉar mankis oportuna maniero legi ilin. Kun la teknika evoluo ĉiam pli oftigiĝas la legado de elektronikaj libroj en naciaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperantujo du eldonejoj proksimume samtempe decidis enmerkatiĝi siajn produktojn en elektronika formo.*

La reta librovendejo de Sezonoj ankoraŭ estas en eksperimenta fazo kun du senpage elŝuteblaj libroj en du formatoj, dum Flandra Esperanto-Ligo jam proponas tridekon da aĉeteblaj libroj en tri malsamaj formatoj.

Esperantlingvaj elektronikaj libroj estiĝis kun la enkonduko de komputila tekstprilaborado, kaj komencis disvastiĝi en komputilaj retoj jam en la unua duono de la 1990-jaroj, sed antaŭ la populariĝo de interreto la libroj estis konataj al relative malvasta publiko.

La unuaj elektronikaj libroj estis simplaj tekstodosieroj, kie pro la teknikaj limigoj de la tempo la esperantaj ĉapeloj estis anstataŭigitaj per iksoj. Pli allogaj kaj facile legeblaj variaĵoj aperis unue kun la estiĝo de Tut-Tera Teksaĵo kaj la ekuzo de la signokodo latino 3, kiu ebligis la montradon de ĉapelitaj literoj.

*Plulegu sur paĝo 3.*



*Elektronika libro en la serio Inko.*

## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Aprilo 2010 • 98-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

**E-post:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2010:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2010:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**Postgiro:** 578-5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,

754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

**e-post:** esperanto@globalnet.net

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
--	-------------------	------------------------

Nr 1	15 januari	15 februari
------	------------	-------------

Nr 2	28 februari	30 mars
------	-------------	---------

Nr 3	30 april	31 maj
------	----------	--------


Nr 4	15 augusti	15 september
------	------------	--------------

Nr 5-6	31 oktober	30 november
--------	------------	-------------

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

## Ralf Jalming



*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Gotenburgo.

*Kie vi loĝas?*

Mi ankoraŭ loĝas en Gotenburgo.

Dum miaj unuaj sep jaroj mi tamen loĝis en la malgranda insulo Knippla.

*Pri kio vi laboras?*

Ĝis nun mi laboris kiel psikiatria flegisto. Baldaŭ mi tamen espereble estos pensiulo.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Multajn! Mi multe legas kaj volonte vojaĝas. Mi interesiĝas pri historio kaj pri diversaj lingvoj.

*Ĉu vi havas familion?*

Mia familio estas miaj frato kaj fratino.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

En 1975 mi legis artikolon pri Esperanto en sveda gazeto pri

aŭstralianino, kiu vojaĝis ĉirkaŭ la mondo per helpo de Esperanto. Poste mi prunteprenis librojn kaj komencis mem studi la lingvon. Ekde 1980 mi aktive partoprenas la movadon.

*Ĉu vi havis aŭ havas lujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Dum kelkaj jaroj mi estis prezidanto de Esperanto-Societo de Gotenburgo. Nun mi estas ĝia revizoro. La klubo havas 54 membrojn. La nombro estas sufiĉe konstanta.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Mi havas apartan intereson pri Ruslando. Pri ĝiaj lingvo, kulturo kaj historio.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

## VORTOJ DE LA REDAKTORO

“En 1975 mi legis artikolon pri Esperanto en sveda gazeto”. Tiujn vortojn ni povas legi en la ĉi-supra intervjuo kun Ralf Jalming. Verŝajne iu tute ordinara esperantisto iris al gazeta redakcio por rakonti ion. La ĵurnalistino interesiĝis kaj verkis artikolon, kiu kaptis Ralf por Esperanto.

Ĉu vi iam iris al gazeta redakcio? Mi povas doni al vi kelkajn konsilojn kiel fari por “kapti ĵurnaliston”. Rakontu pri ia loka okazaĵo, kiu estas iel eksterordinara kaj kiu rilatas al Esperanto. Dum la somero ĵurnalistoj estas pli facile kapteblaj, ĉar okazas malmulte en la socio. Bonan sukceson!

## VORTOJ DE LA ESTRARO

### Förslag till klubbaktiviteter

1. Som modern klubbaktivitet tillämpar vi i Västeråsklubben SkypeVideosamtal med en esperantist ute i världen. Det gör mötet mer internationellt.

Din klubb har säkert en medlem som har denna uppkoppling i sin dator eller i sin laptop.

Om mötet äger rum hos honom eller henne, är det inget problem med internet.

Annars skall lokalen var man har mötet, ha internet och helst inte trådlöst förbindning.

En annan sak som man skall tänka på är, att fråga i förväg att medverka en lämplig partner i den delen av världen där det inte är natt under tiden av mötet. Avtala tid med denna person om det passar så att denne är på plats och har kopplat sin dator till internet. Mer information kan du få hos undertecknad.

2. Vi i SEF-styrelsen skulle vilja att fler klubbar arrangerar ett utåtriktat arrangemang under den Europeiska Språkdagen den 27 september.

Ta kontakt med enheten på din ort som undervisar de nyanlända svenskarna på sina modersmål och fråga om samarbete. Dom kan då göra reklam på sin verksamhet och din klubb kan informera om Esperanto. Detta samarbete kan få olika former men helst på allmän plats, t.ex bibliotek. F.n. finns till förfogande ett utmärkt hjälpmedel i form av en dvd "Esperanto är....." Västeråsklubben har gjort en kortare version av den, som är mindre krångligt att hantera. Den visar samma filmer med tal på Esperanto och undertexter på Svenska. Visa dessa filmer på skärm om det finns möjlighet till det. (kanske har skolan resurser). Lycka till. Styrelsen är intresserad av rapporter om Språkdagen

Wim Posthuma

Senpagaj e-libroj en Esperanto estas troveblaj inter alie ĉe:

[www.esperanto-sh.de](http://www.esperanto-sh.de)  
[i-espero.info/elsutaro/esperantaj-libroj](http://i-espero.info/elsutaro/esperantaj-libroj)  
[www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)

## Elektronikaj libroj alvenis

Daŭrigo de paĝo 1.

La sekvan paŝon direkte al granda publiko elektronikaj libroj faris kun la estiĝo de la formato PDF, kiu ebligas allogan tipografian aranĝon kaj enpaĝigon de tekstoj. Inter la pioniroj de elektronika eldonado estis la konata svedia esperantisto Franko Luin, kies virtuala eldonejo Inko antaŭ deko da jaro publikigis pli ol ducent elektronikajn librojn en Esperanto.

La libroj estis libere elŝuteblaj el la E-librojo de Franko Luin, sed multaj el ili pro kopirajtaj kialoj ne estis printeblaj - manke de porteblaj legiloj, printado estis la ĉefa maniero legi elektronikajn librojn for de la komputila ekrano. Post la forpaso de Franko Luin en 2005 lia E-librojo ĉesis funkcii, sed la libroj mem estis savitaj, kaj de tempo al tempo reaperas en diversaj retejoj, interalie en Ipernity.

Elektronikaj versioj de la revuoj *Monato*, *Esperanto* kaj *La Ondo de Esperanto* estas aboneblaj de kelkaj jaroj, sed legado de tutaj libroj ĉe komputila ekrano estas nekomforta, kaj printado tro kosta kaj neoportuna. Nur lige kun la disvastiĝo de diversaj porteblaj librolegiloj kaj evoluintaj poŝtelefonoj kun granda ekrano iĝis ebla komerca eldonado de elektronikaj libroj.

En kelkaj nacilingvaj merkatoj, precipe en Usono, granda parto de la haveblaj elektronikaj libroj estas ligita al specifaj teknikaj solvoj kiel la librolegilo Kindle aŭ la kopiprotekta sistemo de Adobe. En Esperantujo tia strategio estus dekomence mortkondamnita, ĉar la merkato estas tutmonda, kaj la libroj devas esti legeblaj per loke haveblaj rimedoj. Konsekvence, la unuaj du Esperantaj eldonejoj, kiuj komencis enmerkati elektronikajn librojn, uzas neprotektitajn dosierformatojn, eventuale kun kaŝmarkoj kiuj permesas spuri la aĉetinton, se senpermesaj kopioj aperas en la reto.

En la retejo de la eldonejo Sezonoj la unuaj du provlibroj aperis la 25-an de februaro, kaj jam estis elŝutitaj kelkcentfoje. En la retejo de Flandra Esperanto-Ligo aĉeteblaj elektronikaj libroj aperis en januaro, kaj iliaj prezoj varias de 3,60 ĝis 15 eŭroj - iom malpli ol la prezoj de presitaj libroj, sed klare pli, ol laŭ anticipaj informoj kostos la libroj de Sezonoj.

Libera Folio petis ke Paul Peeraerts ĉe Flandra Esperanto-Ligo, la eldonejo kiu jam havas praktikajn spertojn pri la vendado de elektronikaj libroj, kelkvorte rakontu pri sia strategio.

*Libera Folio:* Kian disvastiĝon laŭ via espero povos en la proksima tempo havi elektronikaj libroj en Esperanto?

*Paul Peeraerts:* Elektronikaj libroj en Esperanto laŭ mi havas grandan estontecon. Kiam mi parolas kun klientoj, mi rimarkas, ke unu el la ĉefaj bremsoj por aĉeti librojn estas la altaj afrankokostoj kaj la risko, ke la libroj entute ne alvenas aŭ alvenas damaĝitaj. Luj aĉetas eĉ nur unu fojon jare, dum kongreso aŭ renkontiĝo, por eviti tiujn riskojn. Ĝuste en tio la libromerkato en Esperanto diferencas de la nacia. Libron en sia propra lingvo oni povas aĉeti en apuda strato; se oni regule volas akiri librojn en Esperanto, oni devas mendi ilin poŝte. Tiun malavantaĝon pri altaj ekspedkostoj la uzo de e-libroj forigas.

*Libera Folio:* Kia estas la strategia plano de FEL ĉe la lanĉo de elektronikaj libroj?

*Paul Peeraerts:* La plano estas, ke ĉiuj libroj, kiujn FEL eldonos, aperos ne nur en papera formo, sed ankaŭ en elektronika, se pri tio konsentas la aŭtoro, kaj se la kostoj kaj riskoj estas akcepteblaj.


Tio ĉi estas parto de artikolo en [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org). Tie vi povos legi la tutan artikolon.

TACK

Svenska Esperanto-förbundet tackar för gåvan, som består av andelsbevis i Esperanto Gården, efter framlidne medlemmen Åke Florbäck.

Pri la jarkongreso

Ne forgesu pri Sveda Esperanto-Kongreso, kiu okazos (12-)14-16 de Majo en Lesjöfors. Vi povas legi pri ĝi en La Espero 2010-1.



Dum la jarkongreso en Lesjöfors, la populara Peter Bankholm kuiros la manĝojn meze de la tago kaj vespere por la partoprenantoj. Li faris la saman laboron dum la jarkongreso en Gotenburgo antaŭ du jaroj. La foto estas farita dum la kongreso en Bjalistoko.

Skribis kaj fotis: Ulla Luin

Reelektita estraro en Skövde

Dek el la dudek unu membroj en Skövde Esperantoklubo vizitis la jarkunvenon en la klubejo.

Ili aŭdis jarraporton, kiu rakontis pri ok kunvenoj kun variaj programoj. Krome la klubo havis printempan ekskurson kaj literaturan kurson kun ses partoprenantoj. Ĝin denove gvidis Hilgon Frisk.

Carl-Eric Ohlsson kaj Solveig Bertilsson prizorgis la presadon kaj distribuon de La Espero al ĉiuj SEF-membroj.

La jarkunveno reelektis la tutan estraron: Hilgon Frisk, prezidanto; Kurt Frisk, Solveig Bertilsson, Börje Andersson, Karl-Gustaf Gustafsson, Karl-Erik Ohlsson, La jarkunveno havis memorigan minuton pri mortinta membro Siw Bakai.

Börje Andersson

Eldona Societo Esperanto denove donacas al Azio, Afriko kaj Latinameriko



Eldona Societo Esperanto la trian fojon ricevis grandan mondonacon de Sveda Ido-Fondaĵo je la memoro de Hellmut Röhnisch. Tiu donaco de 40000 kronoj ebligis al la eldonejo sendi dekkilogramajn pakajojn al Meksikio, Peruo, Kostariko, Kazahio, Uzbekio, Taĝikio, Mongolio, Burundo, Zimbabvo kaj Indonezio.

En ĉiu pakajo estis svedaj libroj en Esperanto, ekzemple: Aniaro, Bona rido, Eduko danĝera, Etimologia vortaro, La Frakseno Igdrasil, Mio, mia filo, Orm la ruĝa kaj multaj aliaj, sume 35 libroj.

Multaj ricevintoj jam respondis. Jen ekzemplo:

*Estimata teamo de Eldona Societo Esperanto,*

*dankon, multan dankon pri la amasa alveno de viaj libroj, kion mi tute ne atendis! Granda estis mia surprizo kiam mi ricevis telefon Alvokon el la Sekretariejo de la Fakoj pri Filologio, ktp, en kiu mi ĵus finis mian someran Esperanto-kurson (jan-feb 2010) ĉar mi ne atendis ion similan. La granda pako ŝajne alvenis dum la komenco de la antaŭa*

*semajno, sed tiam mi ne estis telefone alirebla.*

*La librojn senditajn mi tre aprezas. Mi provos disdoni ilin al tiuj tie ĉi kiujn ili meritas, ekzemple, al miaj ĝelernintoj kaj aliaj gesamideanoj kaj bibliotekoj. Sendube mi ankaŭ povos utiligi ilin en miaj venontaj E-kursoj.*

*Via sendaĵo estas vera stimulo kaj helpo por antaŭenigi la intereson por Esperanto kaj ties kulturo.*

*Via, plej amike kaj samideane, Prof. Hugo Mora  
Universitato de Kostariko  
Kostariko*

Same dankemaj ni estas al la Sveda Ido-fondaĵo, kiu ekestis el la kaso de la iama sveda Ido-federacio.

Sur la bildo vi vidas Ralf Jalming, Leif Nordenstorm kaj Aino Åberg, kiuj kune kun Siv Burell pakis la librojn. Siv ankaŭ fotis kaj tial ne aperas sur la foto. Cetere, la stoko de Eldona Societo ne plu troviĝas en Gotenburgo, sed en Lesjöfors, Karlstad kaj Malmö. Do, en tri diversaj lokoj.

Leif Nordenstorm

## TRA LA MONDO

### Asocio de konstruistoj

TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kreiĝis antaŭ 16 jaroj kaj sukcesis arigi kelkajn dekojn da esperantlingvaj metiistoj, teknikistoj, inĝenieroj, ktp, kiuj ĉiujare verkas artikolojn pri sia fako por la broŝuro Jarkolekto de TAKE kaj partoprenas terminologiajn laborojn.

Nian asocion vi povas malkovri alklakante la adreson de nia retejo <http://take.esperanto.free.fr>

### Chopin-jubileo

La komponisto estas patrono de lokaj elementa lernejo kaj gimnazio kaj krome ekzistas Chopin-strato. Apud la paroĥa domo, kie dum la 2a mondmilito estis gardtenata la urno kun lia koro troviĝas bustmonumento de F. Chopin.

La organizantoj de konkurso volas inviti al la partopreno diverslandajn junajn homojn, ĉefe lernejanon kaj proponi al ili, ke ili desegnu, pentru aŭ prezentu per aliaj teknikoj de plastik-arto scenon el la vivo de Chopin aŭ temon inspiritan de iu komponaĵo de Chopin.

Se vi eventuale estus preta kunhelpi en la akiro de tiaj

artaĵoj, instigante junajn homojn al la partopreno, ni estus tre dankemaj pro tio. Ni ne celas amasan partoprenon kaj ni ne volas akiri amason da konkursoj, sed ni simple volus montri la internaciecon de Esperanto kaj de la muziko de Chopin, kiu atingas diversajn mondopartojn. Do fakte temas pri kelkaj aŭ dekelkaj konkursoj.

Andreo Pettyn  
[a.pettyn@wp.pl](mailto:a.pettyn@wp.pl)

### Nova blogo

Ekde oktobro 2008 Antanas Grincevicius, esperantisto el la litovia ĉefurbo Vilnius, iniciatis tiel nomatan "blogon" pri interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio. Esperanto-temoj tie ankaŭ ne estas fremdaj. Efektive, tiu "Blogo" estas altnivela retgazeto pri Litovio kun la titolo "Barelo". legebla ĉe <http://barelo.blogspot.com/>.

"Barelo" estas imitinda ekzemplo de praktika utiligo de Esperanto.

Sajnas, ke ĝi estas unika en la mondo. Apenaŭ ekzistas io simila en aliaj landoj.

La retgazeto estas profesie farita. Ĉiu artikolo (blogero) estas bele kaj trafte ilustrita. En la retgazeto eblas legi interesajn kaj aktualajn artikolojn pri historio, kulturo, naturo, arto, ekologio, ekonomiko, politiko, energetiko, festoj, folkloro, fotografio, lingvo, literaturo, muziko, scienco, sporto k.s. de Litovio -- entute estas 51 ŝlosilvortoj,  
Povilas Jegorvas

### Lingva konsultejo ekzistas

Akademio de Esperanto en 1999 starigis komisionon Konsultejo de la Akademio, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto per difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la komisiono povas

respondi relative rapide; ĉe komplikaj gramatikaj problemoj kutime daŭras pli longe. La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la konsult-komisiono; tamen la Akademio esperas ke utilas tiu ĉi rapida servo, pri kies manko ofte oni plendis.

### Sama membronombro ĉe UEA

En la jaro 2009 Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM), dum en 2008 ilia nombro estis 5702. La pluso de 11 signifas, ke pasintjare la ofta "kongresa efiko" apenaŭ influis la totalan nombron, kio ne mirigas, ĉar la UK-oj en 2008 kaj 2009 estis praktike same grandaj (resp. 1860 kaj 1845 aliĝintoj). La gastiganto en 2008, Nederlando, pli-malpli konservis la membraron de 2008. En la gastiganta lando de 2009, Pollando, la nombro pli ol duobliĝis. La polan kreskon kontraŭpezis tamen malkresko en kelkaj najbaraj landoj, kiujn Bjalistoko ial ne altiris tiom kiom la pli multekosta Roterdamo. La plej granda la falo estis en Rusio.

### Esperanto en Youtube

La retejo [www.youtube.com](http://www.youtube.com), kiu senkoste montras filmetojn en interreto kompreneble montras ankaŭ filmojn en Esperanto.

Oni ekzemple povas spekti parton de la unua vera beletra filmo en Esperanto - Angoroj - nome la komenciĝon kun la nomo "Pulbazaro de Saint Ouen". Ĝin oni spektis 4040-foje. La unuan parton de la Esperanto-kurso "Mazi en Gondolando" oni spektis 18348 fojojn.

La redaktoro de La Espero tamen kuraĝas menci ian propran plej ŝatatan filmeton "Bebo parolas en esperanto". Ĝin oni spektis 32443 fojojn. Ne maltrafu ĝin!

In

#### Kallelse till årsmöte för Förlagsföreningen Esperanto

Lördagen 15 maj 2010 kl. 9.00  
på Esperantogården, Lesjöfors  
Styrelsen



#### Kallelse till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Lördagen 15 maj 2010 kl. 13.00  
på Esperantogården, Lesjöfors  
Styrelsen

### Rusia Esperantista Kongreso 27-30 Majo

Antaŭ 100 jaroj (en 1910) en Sankt-Peterburgo okazis la unua Rusia Esperantista Kongreso, en kiu partoprenis kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof. Rusiaj esperantistoj celebros la jubileon per tradicia tutlanda kongreso en la dua rusia ĉefurbo kaj invitas gastojn el la tuta mondo.

La kongresejo troviĝas en centra parto de la urbo.

La programo de la Kongreso estos varia kaj multflanka. Enkadre de la Kongreso okazos vica konferenco de REU, kunveno de REJM, prelegoj pri historio de Esperanto-movado en Rusio, pri interlingvistiko, pri lingvaj festivaloj.

Por la kongresanoj estas rezervitaj loĝlokoj en hoteloj de diversaj niveloj, situantaj ĉefe en centra parto de Sankt-Peterburgo. La mendilo por la hoteloj kaj por ekskursaj programo estos sendita al la kongresanoj kun Dua informilo en decembro.

Informas: rek-financoj@reu.ru

### Baltiaj Esperanto-tagoj en Litovio

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn ĉiujarajn somerajn tradiciajn la 46-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-46).

BET-46 okazos en litovia urbo VISAGINAS la 26-an de Junio - la 4-an de Julio, 2010. Ĝi funkcios surbaze de bonege kaj moderne ekipita Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado de VISAGINAS (str. Festivalio 7).

En ejoj de tiu Studcentro okazos ĉiuj aranĝoj de BET-46. Loĝado en studentaj komunloĝejoj de tiu Studcentro kaj en urbaj hoteloj laŭdezire.

Informojn vi trovos en la retpaĝo [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt)

### IJK 2011 en Ukrainio

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno.

Temo proponita por la kongreso estas "Daŭropova evoluo - nova koncepto por homaro". La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio.

Cetere, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Kubo. Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe la paĝaro [tejo.org/ijk/2010](http://tejo.org/ijk/2010).

### Malferma tago

Eksciinte, ke Mark Fettes prelegos en la aprila Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, la emerita angla kantistino Fraŭlino Emily Barlaston kreis spacon en sia densa programo por povi ankaŭ mem aperi en Roterdamo. La populara sopranulino ricevis sian O.B.E. (Ordonon de la Brita Imperio) el la manoj de sia persona amikino reĝino Elizabetino la Dua, kiu tiel dankis ŝin pro ŝiaj servoj kiel primadono kaj kultura diplomatino, kaj pro ŝia laboro kun anglaj skoltinoj kaj skoltinetoj. Krom en kelkaj UK-oj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj, Fraŭlino Barlaston kantis antaŭe en unu Malferma Tago, en aprilo 1997.

La 32-a Malferma Tago okazos sabaton, la 17-an de aprilo 2010, ekde la 10-a ĝis la 17-a horo. Malgraŭ la aldoniĝo de la fama kantistino al la programo, la eniro restos senpaga.

### Esperanta prelego en Tiefosi Templo

Esperanta prelego jam komenciĝis en Tiefosi Templo de Shaanxi-provinco.

Unue, unu aŭ du rapidaj esperantaj kursoj estos starigitaj por meti la bazon de Esperanto en kelkaj tagoj. Poste, regulaj kursoj estos fonditaj por

lernantoj, kiuj longperiede loĝas en Tiefosi Templo. La regulaj kursoj finiĝos en la fino de julio.

La instruaj manieroj kaj materialoj uzataj de la rapidaj kursoj estas memkreitaj.

Dum libertempo, prelegoj pri budhismo kaj psikologia helpo estos organizitaj por ke la lernantoj kun rilataj intereso partoprenos.

[esperanto.china.org.cn](http://esperanto.china.org.cn)

### Popularaj libroj en 2009

La libroservo de UEA raportas:

La ekzerclibreto *Poŝamiko* de B. Allée kaj K. Kovács estis la plej furore vendita libro en la Libroservo de UEA en 2009. Ĝia vendonombro (392) estis preskaŭ duoblo de la klasika lernolibro *Ĉu vi parolas tendare?* de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (213ekz.), kiu post longa paŭzo regajnis altan lokon dank' al mecenata aĉeto por afrikanoj. La tria estis *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker (179ekz.), la plej populara Esperanta libro en la lastaj jaroj, kaj la kvara *Esperanto de nivelo al nivelo* (167ekz.), ekzercilo por ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, redaktita de Márta Kovács.

Aparta statistiko pri unuekzempleraj vendoj donas pli nuancitan bildon pri la efektiva populareco de la titoloj en 2009. La nombrojn de entutaj vendoj ĉefe difinas la kvantaj mendoj de aliaj libroservoj, kiuj evidente pluvendis nur parton de siaj aĉetoj al unuopuloj jam pasintjare. En la alia statistiko venkis *Esperanto de nivelo al nivelo* (51), kio eĉ pli elstarigas la sukcesan starton de la novtipaj ekzamenoj de UEA.

La Libroservo vendis sume por 113 298,47 EUR.

La Libroservo plenumis 1620 mendojn; averaĝa kliento mendis do 2,5-foje.

La katalogon de la libroservo de UEA oni trovas rete ĉe:

<http://katalogo.uea.org/>

## LINGVO

### Skriva med esperantotecken

*En tidigare språkspalt har handlat om olika sätt att skriva esperantotecken utan esperantotecken, genom att använda t.ex. x- eller h-metoden, alltså skriva cx eller ch istället för ĉ. Många gånger vill man dock använda de rätta övertecknade bokstäverna.*

Ett sätt är då att använda funktionen *x-al-unikodo* på Esperantoförbundets hemsida, [www.esperanto.se/x-al-unikodo.html](http://www.esperanto.se/x-al-unikodo.html). Här kan man klistra in text skriven med x- eller h-metoden, men också texter med formen c', c^ eller ^c, och med ett klick få texten omvandlad till Unicode-format med esperantotecken, som man sedan kan kopiera och klistra in i ett dokument eller mejl.

Det är ju dock inte alltid man har tillgång till en internetuppkoppling, och oavsett är det förstås enklare att kunna skriva texten direkt med tangentbordet. För Windowsanvändare finns då till exempel programmet *Esperanta Klavaro*, EK, som man kan ladda ner från <http://www.esperanto.mv.ru/Ek/> och installera.

Om detta känns för avancerat, kan man dock – även på Macintosh – välja finskt utökat tangentbord respektive svenskt med samiska språk i Windows, och då åtminstone skriva de med cirkumflex övertecknade bokstäverna direkt genom att skriva ^ följt av önskad bokstav: ^c blir ĉ osv. U med breve, ŭ, går dessvärre inte att skriva med denna metod, utan får i så fall skrivas med accent, ú.

Olof Pettersson



#### Kio plej bonas?

Du musoj estas en filmejo de kinoteatro. La muso rodas kun kraketo filmobendon. La alia demandas:

- Kia estas la filmo?
- La libro estis pli bona.

## ANEKDOTOJ

### Bezonata helpanto

En aeroplano oni anoncas per interna komunikilo:

-Ĉu estas kuracisto inter pasaĝeroj?

Unu viro stariĝas kaj iras en pilotejon. Post iom da tempo nova anonco:

-Ĉu estas inter pasaĝeroj piloto?

### Kial manĝi

Eta knabo demandas sian patrino dum tagmanĝo:

-Ĉu oni devas manĝi por elkreski?

-Jes, filĉjo.

-Do kial manĝas plenaĝuloj?

### Piedpilko aŭ studado

La patro prenas novan ĵurnalon kaj legas grandliteran titolon: "Miliondolara kontrakto kun fama piedpilko". Li ĵetas rigardon je la filo, kiu legas siajn lernolibrojn, kaj diras kun domaĝo:

-Nu, ĉu vi alĝuiĝis al la lernolibroj? Iru korton kaj ludu pilkon.

-Panjo, panjo, mi ne deziras veturi en ĉi-Aŭstralion.

### Helpo ekzistas

-Doktoro, mia 17-jara filo havas troan pasion al komputilo. Li eĉ dormas apud ĝi. Kiel oni povas malkutimigi lin de tiu aĵo?

-Solve estas tre simpla! Brando, cigaredoj kaj virinoj.

### Tro malfrue

Oni ludis pokeron tra tuta nokto. Finfine mastrino de la loĝejo ekkoleris:

-Ĉu vi iam ĉesos tiujn ludojn en nia domo?!

La mastro:

-Mia kara, ĝi jam ne estas nia domo!

### Sekreto de apotekisto

Apotekisto rakontas al sia nova helpanto:

-Prenu la likvaĵon el tiu ĉi botelo, se recepto estas tute nelegebla.

### Artifiko malkaŝita

Artifikisto elvokis la knabon al scenejo kaj plenvoĉe demandas:

-Knabo, ĉu povas vi certigi, ke vidas min unuafoje?

-Jes, paĉjo.

## RAKONTETO

### La monda financa krizo – ebla solvo ?

*Ĉu la financa sistemo de la mondo ne similas al tiu de la fikciita vilaĝo sube?*

Jen la **turisto**, kiu enpaŝas la hotelon en iu eta vilaĝo,

Ŝi metas 1000 kronojn sur la akceptejan tablon kaj iras por iom rigardi la ĉambrojn.

La **hotelestro** tuj prenas la milkronbileton kaj iras al la buĉisto kaj pagas sian ŝuldon.

La **buĉisto** do iras kun la mono al la farmisto kaj pagas sian ŝuldon.

La **farmisto** prenas la monbileton kaj rapidas al la benzinstacio kaj pagas la fuelon, kiun li kredite benzinumis.

La **servisto de la benzinstacio** tuj iras al la vilaĝa amoristino kaj pagas sian ŝuldon de mil kronoj.

La **vilaĝa amoristino** iras al la hotelestro kaj pagas sian ŝuldon per la monbileto.

La **hotelestro** remetas la monbileton sur la tablon.

La **turisto**, kiu nun finrigardis la ĉambrojn, revenas al la akceptejo. Al ŝi ne plaĉis la ĉambroj kaj ŝi reprenas sian monbileton kaj foriras.

Neniu do gajnis unu solan oeron, sed la tuta vilaĝo nun estas senŝulda kaj povas antaŭvidi la estontecon kun fido. Verŝajne la monda financa krizo finiĝos simile ?

Tiun ĉi rakonton sendis al La Espero Gotenbarga studrondo. Ni dankas.



**Sommarkurs i Esperanto**  
13-21 juli 2010 i Lesjöfors.  
Beställ information på [kurs.egarden@esperanto.se](mailto:kurs.egarden@esperanto.se) eller per post Esperanto-Gården 680 96 Lesjöfors.  
Hjälp till att anslå och kopiera bifogade affischer.

## Ivo Lapenna en memoro

Ekde komence ekzistas tensio inter esperantistoj, kiuj unuavice konsideras sin anoj de lingva komunumo kaj aliaj, kiuj opinias la esperantistaron lobianta movado. Ivo Lapenna (1909 – 1987) elstaras kiel plej brila reprezentanto de la dua kategorio.

Kiel gimnaziano en Zagrebo li konatiĝis kun esperanto kaj tuj komprenis ĝian valoron. Frue en la tridekaj jaroj li komprenis la danĝeron de la faŝismo kaj naziismo kaj interalie avertis kontraŭ okazigo de la fatala UK en Kolonjo en 1933.



Grandan influon en la internacia movado li ricevis en 1947, post kiam Internacia Esperanto-Ligo definitive aneksis UEA kaj transprenis ĝian nomon. Kiel ĝenerala sekretario en la nova organizaĵo li komencis la laboron "konstrui la modernan UEA" – kaj sukcesis.

Lia ideo estis fari el UEA instrumenton, per kiu gajni la favoron de UN por esperanto. La plej akuta problemo, kiun li devis solvi, estis la afero pri neŭtraleco. Ĝi estis kaj en IEL kaj en UEA forte kompromitita. La solvo de tiu problemo atestas pri la brile pragmata diplomatia talento de Lapenna.

Unue li distingis inter malkuraĝa "pasiva neŭtraleco" kaj laŭdinda neneŭtraleco, ekde tiam nomata "aktiva neŭtraleco". Tiu lasta estis identigita kun la politiko de UN kaj tiamaniere la neŭtraleco estis ŝanĝita de peza sinkigilo al oportuna balasto. Tio provizis al

li la necesan ekvilibron por kapabli navigi inter la blokoj dum la malvarma milito.

Unuflanke la aktiva neŭtraleco estis sufiĉe rigora, aliflanke la ideologia ligo al UN permesis certan elastecon. Se UN povis allasi diktaturojn kiel membroŝtatojn, tiam kompreneble UEA povis allasi landajn asociojn el diktaturoj kiel membro-organizaĵojn.

Alia por Lapenna grava koncepto estis la "humaneca internaciismo". La radikalan homaranismon de Zamenhof la plimulto de la esperantistoj forreznis jam dum la epoko de Louis de Beaufront. El ĝi restis nur la "interna ideo", kiun Lapenna nomis "humaneca internaciismo", termino pli komprenebla en UN kaj krome kontrasta al la termino "proleta internaciismo" uzata de la socialismaj membroŝtatoj en UN.

Lapenna iniciatis grandegan kolekton de subskriboj por peticio al UN favore al esperanto. UN sendis la peticion al Unesko, kie Lapenna tre lerte agadis kaj atingis en 1954 akcepton de poste fama rezolucio.

La rezolucio estis triumfo por Lapenna, sed bedaŭrinde intensiĝis propagando kontraŭ esperanto asertanta, ke ĝi kiel lingvo ne estas taŭga. Tio ankoraŭ nun trompas esperantistojn vane defendi la lingvon, anstataŭ senvalorigi tian argumentadon per kultura agado.

Post la sukceso en Unesko Lapenna iniciatis ankoraŭ unu similan peticion, kiu tamen fine de la sesdekaj jaroj renkontis absolutan indiferentecon ĉe UN. Tio povas esti unu el la kaŭzoj, kial en UEA kritiko kontraŭ Lapenna komencis kreski.

En IJK en Tyresö en 1969 la junularo aliĝis al la kritiko kaj poste ankaŭ komitatanoj el kelkaj landaj asocioj de socialismaj landoj.

Dum la kongreso en Hamburgo en 1974 Lapenna konstatis, ke li

perdos sian pozicion en la estraro. Li ne estis tia persono, kiu volis hontante kaj humile forŝteliĝi, sed preferis eliri kun forta bruo kaj frapi la pordon post si.

Ankaŭ post sia rezigno pri posteno en UEA li laŭdirde kaj energie laboris por esperanto kiel ĉefa inspiranto de Neŭtrala Esperanto-Movado. Sed en 1987 unu el liaj sukcesoj kvazaŭ ironie rebatis al li.

Por kiel eble plej masive impresi ĉe UN li antaŭe estis strebinta kolekti ĉian esperanto-aktivecon, escepte tiun de SAT, ĉe UEA. Kiam li nun, en la jubilea jaro, klopodis kunlaborigi ĉiujn organizaĵojn por komuna manifestado, ĝuste UEA obstaklis postulante hegemonian statuson.

Kutime estas tiel, ke la venkintoj verkas la historion, sed pri lia konflikto kun UEA fakte li, la malvenkinto, faris tion, asertante, ke temis pri atenco al unu el liaj ĉefaj ideoj, nome la "aktiva neŭtraleco".

Tiu aktiva neŭtraleco tamen nur malrapide ŝanceliĝis kaj pasis pluraj jaroj antaŭ ol ĝi atingis staton de aktiva malneŭtraleco per tio, ke UEA-prezidanto apogis la Ĉinian politikon en Tibeto. Tio estus absolute neimagebla dum la epoko de Lapenna.

La oponantoj kontraŭ Lapenna ne publike prezentis koheran opozician programon, la konflikto dum liaj lastaj jaroj ankoraŭ vekas fortajn emociojn kaj la problemoj, kiujn li frontis daŭre estas nesolvitaj.

Kiel neniu alia li heredigis al la esperantistoj memestimon per siaj brilaj talentoj kaj laboro kaj per tio, ke li kuraĝis alstrebi altan celon. Samtempe li heredigis al UEA dilemon ĝis nun ne solvitan: la memestimo malfacile povas daŭri, se la celo longtempe restas sama, tamen ekster videbla atingo.

Bertil Nilsson





Vandrarhem – Kursgård  
Öppet året runt – sen ankomst OK  
Gäster med husdjur bör förboka

Esperanto-Gården  
Stiftelsevägen 1  
680 96 Lesjöfors

Telefon 0590 – 309 09  
Mobil 070 767 54 55

e-post: [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)

## ESPERANTO

internationell kurs 13 – 21 juli 2010  
på Esperanto-Gården i Lesjöfors

### *En kurs för dig som:*

- ser jordens språkliga och kulturella mångfald som en tillgång för mänskligheten
- vill att nationella särarter får bestå och utvecklas i fredlig samexistens
- vill skaffa dig en direktkontakt till människor i andra länder
- kan skaffa dig ett verktyg för fredlig samlevnad på lika villkor

### *Fördelar med att lära sig Esperanto:*

- ett språk som är mindre svårt att lära sig än traditionella språk
- ett språk som går att lära sig att helt behärska

### *Du och den språkintresserade finner att Esperanto:*

- logiska uppbyggnad, är nyckeln som ökar möjligheten att förstå andra språks struktur.

*Esperanto vidgar dina vyer och förståelsen för livet på vår planet.*

Undervisning i fyra nivåer

1. barngrupp – 2. nybörjare
  3. fortsättning – 4. konversation
- extra lektioner i andra ämnen\*

Ca 6 timmar undervisning per dag, med svenska och utländska lärare. Även i nybörjarkursen står det talade språket i centrum med direktmetod och erfarna lärare.

1. vakant 2. Carl Mäsak 3. o 4. Tatiana Rudakova, Moskva och Gerhard Tobias, Polen/USA.

**\*Årets nyheter!** Efter lunch kan du delta i...

Esperantologi – en kurs med Roland Lindblom som lärare.

Översätt din dikt eller sångtext till esperanto! Handledare Martin Strid.

Esperanto i scoutvärlden – Lord Baden Powell ville att scouterna skulle använda esperanto.

**Boende:** enkel-, dubbel- eller flerbäddsrum, eget tält, husvagn/bil, hemma = dagelev

**Intressant – kontakta:** Esperanto-Gården eller e-post: [kurs.egarden@esperanto.se](mailto:kurs.egarden@esperanto.se)

Så sänder vi kursprogram med priser och blankett för din anmälan till årets kurs.

Esperanto - för världsmedborgare med en demokratisk värdering.